

**AVENO # 41 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj
Januaro - Decembro 2015**

Jen ĝeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj kaj diversaj peticio-petoj, aliaj trovighas je Ekologio & Homaj Rajtoj

La kotizo por AVE estas libervole paginda - proponite: 5 EUR jare, pli au malpli eblas.

Nia UEA-Konto: avex-z; Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A
Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

Elkoran dankon - Manfred Westermayer, la sekretario.
Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Br., Germanio
Retejo de AVE: <http://www.verduloj.org>
Nia interreta diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

Koncize:

1984 - 2014 AVE kunvenis por festi la 30-jarighon:

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur www.verduloj.org)
- Federacio de Junaj Europaj Verduloj
- Europa Verda Partio

Datumbazo de Esperanto-parolantaj organizajhoj - kaj Maklerejo: <http://per.esocom.de>

La projekto <http://www.lingvo.info> celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ...

La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)

01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)

02-21 : Internacia Tago de la Patrino Lingvo

03-08 : Internacia Tago por Virinoj

03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto

03-21 : Tago de la Mondcivitanoj

03-22 : Internacia Tago por la Akvo

04-20 : Tago de la Tero

05-09 : Europa-Tago

05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita ŝtato Israelo (1948)

05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo

06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj

=== Detale lau la dato ===

2015-11 rekomendinda nova Esperanto-Reta Radiostacio

Jam de longe mi regule aŭskultas la ĉiu-tagajn elsendojn de Esperanta retradio, lanĉita de Aŭstrio fare de Anton Obendorfer, sed iom post iom inkluzivinte Esperantistoj el pluraj landoj. Laŭ mempriskribo ĉi-tiu radio estas ne-politika. Tamen multaj el ĝiaj elsendoj pritraktas ekologiajn kaj kulturajn demandojn.

Eblas legi kaj auskulti - kaj komenti.

(dankon por la informo al Michael)

<http://esperantaretradio.blogspot.fr/2015/10/kiel-mi-uzas-esperantan-retradion.html>

= =

2015-11-08 Raporto pri la 3-a projekto Akvo por Kalima

<http://esperanto.cri.cn/581/2015/10/27/165s181399.htm>

Kaj jen ankaŭ interesaj blogoj de Betty Chatterjee:

<http://rosejo.blogspot.dk/>
<http://kopenhago.blogspot.dk/>
<http://www.kiva.org/invitedto/esperanto/by/betty4078>
(dankon al Betty kaj Ghoja de China Radio Internacia)

2015-12-11/12 Klimata Pintokonferenco en Parizo – Esperantistoj kune partoprenos:
Ronaldo Nobel partoprenos kaj shatus kontakti kun aliaj esperantistoj por agadi kune en Parizo.
Lia telefono en Parizo: 0031 6 27477622, kaj ret-adreso: ro-esp@dds.nl

2015-10-04 Brazilo, Indonezio, Malajzio: chu Preparoj por la Klimataj Katastrofoj ?
La nun planataj decidoj en Brazilo, ke ekspluato da resursoj eblos kaj en protektataj teritorioj,
kaj en garantiitaj por la indighenoj, minacas la amazonian pluarbaron. Kie situas la turnigho-
punktoj.

Oni ne scias kie trovighas tiu punkto, sed poste – kiam ni eksciintos - ech la pluarbaro ne plu
travivos, char mankos la humideco.
(lau informo de WWF: wwf.panda.org)

Komento de AVE/mw: Mi esperas ke el la grandaj vortoj de politikistoj en Parizo ighos bonaj kaj
honestaj interkonsentoj;

Kaj en Brazilo, kaj en la Pacifikaj insulaj shtatoj, ktp.

Char la klimato estas tutmonda afero. Se ni daurigas forbruligi arbarojn kaj fosilian karbonon
tiom rapide, la klimato ighos katastrofa.

Gravas ekscii, ke la t.n. Turno-Punkto (angle: tipping point) malhelpos simplan reiron.

Mi audis de spertulo ke oni antau jardeko planis uzi la amazonian parton de Peruo por
agrikulturo de rizo ktp. Sed la humusa tavolo estas tiom maldika, ke ghi jam estis difektita je la
prilaboro post la forhakado (au forbruligo ?). Restis shtona malfekunda ebena.

Same ankau la forbruligoj de pluarbaroj en Indonezio, Malajzio, ktp. simile minacas – ech se la
grundoj estus pli profundaj (mi ne scias).

Ni ja scias, ke ech proksime de la maro povas ekzisti sekaj dezertoj (ekz-e la Namib).

==

2015-09 Pluraj videoj pri Kalima

jen ligo al Jutjube kie Alphonse provizas ch. 6 videojn pri la vivo en Kalima.

Kompreneble plej multaj rakontas pri la situacio koncerne la akvo-provizon;

montras la kranaron Betty (finkonstruita komence de 2015), la hospitalon (kiu ricevis akvon
pere la unua projekto) kaj montras ankau la simplajn fontojn, kiuj dum la seka periodo ne donas
akvon, kaj kies akvo ne estas sufiche pura por trinki.

Nun ni kolektas por la 3-a projekto, kiu provizos salubran akvon al ch. 1800 familioj – au pli.

Restas ancorau pluraj kvartaloj sen bona akvo.

<https://m.youtube.com/watch?v=dZGt8dHg3T8&feature=share>

==

2015-09-21 ALTERNATIBA atingis Parizon – en Esperanto

Ili do decidis amplifi la mobilizadon tra tuta Eùropo, kaj se eblos tra la tuta mondo .

Ili do lanchas alvokon al tradukado de la chefaj iliaj dokumentoj, kiel jam je pluraj samideanoj,
ni jam faris .

Vidu - ilia retejo ankau „parolas“ Esperanton:

<https://alternatiba.eu/eo/alvoko-por-prialternativa-mondo-vilago-en-parizo-dum-la-cop21-la-5an-kaj-6an-de-decembro-2015/>

Jam ekzistas iom da informoj ankaù en la angla (kun du filmetoj je 3mn), en la hispana

<https://alternatiba.eu/es/prensa/videos-3/>) en la germana (<https://alternatiba.eu/de/>

(de Emile Mas, kiu ankau serchas tradukantojn pri la klimato-temo & Alternatiba en aliaj lingvoj.

Bonvolu respondi al li: espergala@wanadoo.fr

= =

2015-08-07 Denove misformitaj kruroj kaj manoj

Evidente ancorau ne chiu kuracisto en Tanzanio scias, ke kuraci Malarion che tre junaj homoj

pere de hihinino (en la pugo-muskolon) kausas misformigon de la gamboj au piedoj pro diferencaj tensioj en ambau muskoloj.

Denove tio montrighis je 3 geknaboj inter tiuj unu havas misformitajn manojn.

Mramba rakontis, ke la patrinoj havis malarion dum ili estis gravedaj, kaj ankau la beboj estis tiel kuracitaj: Vidole Wambura 4j, Mgaja Magori 6j, Chausiku Rubesa 5j.

La operacio ne kostas multon: inter 200 kaj 300 Euroj.

Bonvolu kun-financi, por ke la infanoj denove povas salti kaj ghoji - al la UEA-konto de AVE: avex-z „operacio “

2015-08 sukcesa pasho por la financado de la 3-a projektoj

Je la 31-a Manfred havis la eblecon prezenti la projekton je la germana firmao Wasserkraft Volk AG, Gutach (Nigra Arbaro), kiu produktas mezgrandajn akvo-forto turbinojn kaj ankau la elektro-generatorojn. Ili subtenos la projekton denove per 5000 Euroj.

Pro la malforteco de la Euro la projekto koston ch. 11.000 Euroj.

De la mankantaj 6000 esperantistoj donacis au promesis donaci jam 2000.

Do, mi petas vin subteni ghin en la venontaj 2 monatoj lau viaj eblecoj.

Se vi estas membro de UEA, bonvolu transpigi al nia konto avex-z, kun rimarko „Akvo por Kalima“, kaj via nomo.

Se vi ne havas konton che UEA, vi povas transpigi al la bank-konto de UEA:

IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64, BIC: INGBNL2A „por avex-z, Kalima“ au operacioj

==

2015-07-28 Kunveno de AVE-anoj okaze de la 100-a UK en Lille

Manfred salutis la ch. 50 partoprenantojn kaj prezentis koncize AVE-on.

Betty prezentis la trian projekton „Akvo por Kalima“ en la provinco Maniema, D.R. Kongo; bedaurinde mankis komputilo (mi, Manfred mendis nur projekcion ...) - sed informoj kaj fotoj trovighas sur nia retejo: verduloj.org .

Je la Movada Foiro, dum la Faka Gicheto kaj la AVE-kunveno ni kolektis entute 480 Eurojn por tiu projekto. Al la AVE-konto avex-z alvenis jam pluraj 100-oj i.a. dank al Betty kaj Catherine.

Ni ricevos 5000 denove de WKV AG; sed mankas ancorau ch. 4000.

Interesa demando estis, chu subteni tiun projekton antaŭenigos Esperanton en la DR Kongo ?

Ni ne certas, sed chiukaze ghi pli-vastigas la informojn pri Esperanto en tiu regiono.

Rene disdonis informilojn pri „Alternatiba“, pri kiu AVE jam informis - kaj troveblas dokumento sur verduloj.org pri tiu CSO, por subteni klimato-favoran politikon - bonvole serchu sur la unua ret-pagho de verduloj.org .

Krome ni parolis pri la agado de AVE enkadre de la Verdaj Partioj, lau-lande kaj tutmonde. Sekvis riprochoj, kial la Verdaj Partioj sur-papere akceptas Esperanton, sed la politikistoj ne agas por ties enkonduko, ekz- en la Europa Parlamento. Do, fakte ni ja povas uzi la pozitivan sintenon de la Verdaj partioj, ech se ne chiuj partiaj altranguloj konsentas; sed la bezonatan agadon devas fari ni esperantistoj ene de la partioj - kompreneble tio rilatas ankau al aliaj partioj.

Aparte menciinde estas, ke Ulrike Lunacek, membro kaj vic-prezidantino de la EP por la frakcio Verduloj kaj Regionalistoj, salutis la UK-on - kion ni audis dum la Solena Malfermo. Supozeble Walter Klag en Vieno tre dankinde instigis shin.

Ursula rakontis ke la franca senatano Joel Labeta de EELV konfirmis al shi en la lasta Rio-konferenco, ke li subtenas la ideon de Esperanto.

Michael Leibman, de la francaj Verduloj kontaktos lin. AVE havas ne tre aktivan diskut-grupon „Verduloj“ sur lpernity.com; aliaj proponis Fejzbukon.

Li ankau diris ke necesos trovi sekretarion dum la sekva jaro, char Manfred post 25 jaroj finos tiun laboron.

==

2015-07-28 AVE salutas la gekongresanojn de la 100-a UK en Lillo.

Nome de la Asocio de Verduloj Esperantistaj mi salutas chiujn esperantistojn okaze de la 100-a Universala Kongreso en Lillo.

Ni kunlaboras kun UEA jam delonge kaj ghojas, ke la nocio de Daurigeblo ighis grava temo ankau por la oficiala laboro de UEA.

Ni ankau kunlaboras regione kaj tutmonde kun Verdaj Partioj kaj Civil-Sociaj Organizajhoj por redukti la riskojn pro nia iom abunda vivstilo, kaj subtenas per informado al Transiro el la fosilia erao en la Urboj kaj Shtatoj.

Ni atendas ke la chi-jaraj Klimataj Pinto-Interkonsentoj en Parizo atingos cel-trafajn decidojn, kaj ni kunlaboras kun „Alternatiba“ kies teamo faras kvin-mil-kilometran bicikladon por informi en cento da urboj en Francio kaj meza Europo por la celo redukti la homan karbondioksidan ghenon al la tutmonda klimato.

Paralele ni subtenas konkretajn agadojn cele la realizigo de la t.n. Mileniaj Evoluaj Celoj de Unuighintaj Nacioj, ligita i.a. kun la nomo de Wangari Maathai, - aparte pri rearbarigo kaj salubra trinkakvo.

Vi trovos la dokumentojn pri tio sur nia retejo:

verduloj.org - Do, bondezirojn por sukcesplena laboro kaj interkonatigho enkadre de la 100-a UK.

==

2015-06-21 Akvo por Kalima - tria projekto:

Dank al germana firmao Wasserkraft Volk ankau la 3-a projekto ricevos 5000 Eurojn; sed necesas 10.000 - do, ni devas kolekti denove inter la esperanstistaro.

Vi povas subteni la projekton pere de iom(et)e pli alta kotizo al AVE. La normala kotizo (5 Euroj) estas libervole paginda, prefere al nia UEA-konto: avex-z

Bonvolu noti „Kotizo kaj Por Akvo, via nomo“

.

Jen nova blogero (en la angla) pri la akvo-projekto de 2015, por disdoni al viaj ne-esperantistaj geamikoj.

Dankon al Betty!

<http://elinjo-lifeisahotch-potch.blogspot.dk/>

==

2015-03 Esperanto en la EU Komisiono:

La Komisionano pri Sano kaj nutrajsekureco Vytenis Povilas Andriukaitis, el la partio S&D, estas esperantisto. Legu plu en la artikolo de Povilas Jegorovas, aperonta en la marta kajero de "La Ondo de Esperanto" jam legebla en la novaĵretejo La Balta Ondo.

<http://sezonoj.ru/2015/02/litovio-7/>

(dankon al JK Rinaldo, Europaj Federistoj)

--

201503 Lerneja agado ekzemplodona en Herzberg am Harz [harc]

<http://edukado.net/novajhoj?id=530>

===

2015-03-03 Raporto kaj Fotoj el Kalima

Betty informis en sia blogo pri la realigita dua projekto „Akvo por Kalima“ kaj ankau instalas fotujon, kie vi povas vidi la koncernajn laborojn, homojn, kaj krome la pejzaghon kaj la agrikulturan kaj fish-kulturan kooperativon PIEADC.

(je la dato: 3/03/2015) <http://rosejo.blogspot.dk/>

jen la fotujo:

<https://plus.google.com/u/0/photos/105812512489400940015/albums/6118030310202856481?authkey=CiHoqfjKslOukAE>

===

2015-02-21 Festoj de civitaneco: Maidan (Kievo, 1 jaro), rememoro al Gezi (Istanbul), Athen, Hongkong, Tunizio, Kairo, Pekino (35-a de Aprilo 1989), ... Bastille (Parizo)

Samtempe manifestaciis amaso en Moskvo kontrau tia civitana engaghigo - organizita de la reghimo.

Putin iomete pravas, ke temas pri influo de la okcidento – tamen, malpli de Usono; sed ja el la plumo de filozofoj kiuj vekis la civitanecan senton en la homoj.
Pli pri tio en pluraj lingvoj: http://de.wikipedia.org/wiki/Open_Society_Foundations
En Kievo temis i.a. pri agado kontraŭ la korupcio de la reganta familio Janukovic – kiu shtelis miliardojn de sia popolo; vidinda malbona ekzemplo estas la palasto de Janukovic.
Malferma Socio estas rimedo kontraŭ ajna korupcio.
(AVE / mww)

2015-02 Akvo por Kalima, parto 2 realigita

Etienne kun helpo de 6 libervolaj junuloj sukcesis meti longdistancon tubon por provizi plian kvartalon en sia urbo Kalima, provinco Maniema, D.R. Kongo.

La projekto, kiu donas akvo-provizon por pli ol 3000 homoj, estis ebla dank al financaj subtenoj de firmao WKV AG, Stichting voor Kommunikatie, AVE (kiu organizis la kolekton) kaj Betty Chatterje. Detalan raporton kun fotoj (6 MB) au sen fotoj (42 kB) vi trovos je la komenco de www.verduloj.org

2015-07 AVE en Lille: Kulturoj de Dauripovo kaj Transdisciplineco

Jen ligilo al baza teksto de AVE pri lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo de kulturoj.

www.verduloj.org/AVE_2015_UK-Lille.pdf

(verkita de Wolfgang Guenther, Ecomed kaj AVE)

2015 ALTERNATIBA okazos en tuta Europo

kunlabori por teni la klimaton – okaze de la Pariza Klimato Konferenco 2015

(de, en, es, fr) www.alternatiba.eu

Teksto en Esperanto: & la franca www.verduloj.org/Alternatiba_2015.pdf

(dankon al Emile Mas)

===

2015-02 Bonvolu helpi denove al Franko Hounsounou

François Hounsounou, Esperanto-aktivulo el Benino, dank al pluraj mondonacoj de esperantistoj sukcesis subteni ankau la 3 orfajn genevojn, inkluzive lernejon kaj metio-lernadon.

Sed nun la 8-kapa familio devis trovi pli grandan loghejon, kaj decidis konstrui mem - aliflanke la lupago estus daŭra problemo. Plejparton li financas el sia kuranta salajro, sed tio jam estas je sia limo. Mankas minimume 800 Euroj. Do, se iu el vi povas subteni lin, bonvolu transpagi inter 10 kaj 50 Euroj (au ech pli) al lia konto che UEA: hufs-j, rimarko: „al F. Hounsounou pro 3 orfoj, de ...“

(anticipan dankon, Manfred)

===

2015-02 Bonvolu subskribi por malpermesi la Neonicotinoidajn insekticidojn en EU:

La iniciativo venas de orginie franca organizo por daurigebla agrikulturo.

Sen abeloj granda parto da plantoj havos problemojn, kaj simile kiel abeloj reagis ankau aliaj insektoj.

(en) <http://actions.pollinis.org/actions/stop-neonics-en/index2.php>

(fr) <http://actions.pollinis.org/actions/stop-neonics-fr/index2.php>

(de) <http://actions.pollinis.org/actions/stop-neonics-de/index2.php>

Ghenerala pagho: pollinis.org

Pli pri tiuj insekticidoj je (de) <http://de.wikipedia.org/wiki/Neonicotinoide>

tie vi trovos multajn alilingvajn paghojn (ankorau ne en Esperanto).

Interese: la historio de tiu wikipedia pagho(j) estas tre ampleksa.

2015 Gresillon / Greziljono invitas al pluraj interesaj kunvenoj-seminarioj-kulturajhoj:

Jara agendo/kalendaro en gresillon.org/agendo

2015-01 aldono al la financa Raporto de AVE:

En la antaŭa mesagho mi raportis ne-komplete pri kelkaj malgrandaj subtenoj - entute 837 Euroj

Benin (108) orfoj de la frata familio de Fr. Hounsounou.

D.R. Kongo (20) konstruo de kokejo de Th.Mayoma.

D.R. Kongo (219) orfoj en Goma, por lernokostoj: <http://solidarecobonavolo.weebly.com>
Madagaskaro (370) PV-panelo por garantii la jogurt-produktadon, H. Fidilalao.
Bangladesh (120) Mati, ebligi lernadon al knabinoj por eviti tro fruan edzinighon.

====

2015-01-21 Funebro: Hans Bakker mortis la 21-an de Januaro 2015 en la aĝo de 78
Estis bone havi Hans kiel fona subtenanto de la (politikaj, ekologiaj, ..) Verduloj en la Esperanto-
movado.

Kaj ni scias, ke li estis la koro kaj motoro de la esperantista Por-Afrika-Agado - vera pioniro.

Finfine - li kaj lia edzino Ans zorgis per tuja subteno, ke la dua projekto de "Akvo por Kalima"
ricevis la mankantan monon.

„Akvo por Kalima“ portados la rememoron al Hans, kaj mi esperas ke ghi bone sukcesos, ankaŭ
por la estontaj kvartalo-projektoj.

La memoro al li restos tre tre longe kaj tutmonde. Videbla ankaŭ en <http://www.Edukado.net>

2015-01 planita AVE-renkontiĝo okaze de la UK en Lille

Por havi la ideon kiom grandan salonon ni bezonas, mi petas vin informi ĉu vi planas
partopreni la AVE-kunsidon okaze de la UK.

Niaj francaj geamikoj de la Esperanto-Komisiono de la Verda Partio EELV planas organizi
ekologian ekskurson okaze de la UK. Mi informos kiam la detaloj videblas.

Pri nia kunagado enkadre de SAT: ni serĉas SAT-membron kiel respondeculo por daurigi la
kunagadon de AVE en la Ekologia Frakcio de SAT.

Konciza raporto pri AVE en 2014

Ne eblas diri la precizan nombron da AVEanoj, ĉar mi ne plu zorgis por tiu datenbanko.

Restas la ret-listo. Kaj nur malmultaj tenas la kontakton per letero.

Pluraj interesighas kaj ricevas rete - eble legas - AVENOn, sed ne estas membroj.

Nur malmultaj malabonis AVENOn au malanighis.

Mi ghojas, ke de tempo al tempo venas novaj h/nomoj, parte eĉ membroj de Verda (au simila)
partio. Do, mi opinias, ke nia nombro estas pli ol 300.

Financa raporto de AVE:

Ankaŭ gravas ke pluraj el vi (13) pagas la kotizon (5 Euroj)- plejparte al nia UEA-konto: avex-z
Kiel aktiva kunlaboranta fakasocio de UEA ni havas jarajn kostojn de 63 Euroj, aldone ni pagas
por salono se ni renkontighas enkadre de UK, la lasta en Rejkjavik - la sekva estos en Lille

Aparte mi dankas al tiuj, kiuj subtenis niajn projektojn per mondonacoj: rekte al la AVE-konto
(620), al FEL (700) au al mi persone (1238);

Aparte por subteni la projekton „Akvo por Kalima“ pagis Stichting (tra Hans & Ans Bakker)
4.000, kaj de malgranda germana firmao Wasserkraft Volk AG, WKV (5.000).

Do, entute AVE povis subteneti 4 afrikanojn (en Benin, DR Kongo, Madagaskaro kaj Senegalo),
je iliaj urghaj bezonoj (837), kaj pli forte subteni tri grandajn projektojn:

- operacii deformitajn gambojn enkadre de la projekto Mazingira, Tanzanio (Mramba Simba):
942

- daurigi subteni orfojn por daurigi la lernadon de Mazingira (Ketare k. Salama apud Bunda):
700

- subteni la projekton „Akvo por Kalima“ en D.R. Kongo (de Etienne Katchelewa): 10.109

La projektoj de 2013 - tute koncize:

- unua projekto de „Akvo por Kalima“ por 70 familioj + hospitalo (ĉ. 3.000 euroj), dank al WKV
- oleopremilo por Mazingira, ili kultivas sunflorojn kaj nun mem produktas la oleon, por
memstarighi - 2446 - inkluzivas ĉ. 900 por la lernokostoj de orfoj.

====